

## Ni ne estas antaŭ nia tempo

Antaŭ nelonge sveda diplomato esprimis la ideon, ke la esperantistoj estas antaŭ sia tempo. Li opiniis verŝajne, ke nia ideo estas bona, sed ke la mondo ankoraŭ ne havas bezonon por ĝi.

Kontraŭe al tiu diplomato mi ne opinias, ke ni estas antaŭ nia tempo.

La problemoj, al kiuj ni havas solvon — esperanton — ekzistas ĉirkaŭ ni hodiaŭ, ne en ia nebula morgaŭo.

Hodiaŭ homoj renkontiĝas en konferencoj kaj havas bezonon uzi teknikajn helpilojn kaj aliajn homojn por interkompreniĝi.

Hodiaŭ svedaj studentoj en svedaj universitatoj devas akcepti kiel studlibrojn librojn en la angla, lingvo kiun nur kelkaj el ili bone regas.

Hodiaŭ fabriklaboristo Johansson, dum turista veturado en Francio aŭ Hispanio devas uzi siajn fingrojn por kompreniĝi sin, se li volas aĉeti botelon da biero aŭ pecon da pano. Tiu fabriklaboristo Johansson havas nenion eblecon interŝanĝi vortojn kun franca laboristo.

La partoprenantoj al konferencoj komprenas la lingvan problemon kiel sian personan problemon. Ja estas li aŭ ŝi, kiu malbone parolas la konferencajn lingvojn — malgraŭ tio, ke li aŭ ŝi estis sendita al tiu konferenco ĝuste pro siaj "bonaj" lingvokonoj.

La svedaj studentoj same komprenas tion kiel personan problemon, kaj kiel la fabriklaboristo Johansson komprenu tion, se ne kiel personan problemon.

Ili ne komprenas, ke la problemoj estas universala, kaj ke ili sentas tiun problemon, ĉar ili estas diskriminaciata grupo.

Oni ne povas postuli, ke tiu kiu estas diskriminaciata komprenu tion. Daŭris longan tempon antaŭ ol aliaj diskriminaciataj grupoj en la monda socio komprenis, ke ili estas diskrimi-

naciataj, kaj komencis postuli siajn rajtojn.

La negroj en Usono estas unu tia grupo. Antaŭ nemultaj jaroj plej multaj el ili akceptis pli malbonajn laborojn, pli malaltajn salajrojn, pli malbonajn loĝejojn. Ili haŭto ja estis 'nigra', 'malpura', do estis juste, ke oni tiel agu kun ili. Sed iom post iom ili ekkonsciis, ke ilia haŭtkoloro estis uzata kiel argumento por diskriminacii al ili.

Virinoj daŭre restas diskriminaciata grupo. "La ĝentila sekso" estis longe (kaj daŭre restas) pritraktata kiel malpli forta, do virinoj havis malpli altajn salajrojn. Eĉ kiam forteco havis nenian signifon por la laboro farata.

Ankoraŭ hodiaŭ okazas, ke viro ricevas por ekzakte sama laboro pli altan salajron ol virino. Kaj daŭre ekzistas virinoj, kiuj opinias, ke tio estas justa. Aliaj virinoj komprenis sian diskriminacion kaj laboras por forigi ĝin.

Ni esperantistoj batalas kontraŭ alia diskriminacio — la lingva. En nia batalo ni eble povas lerni ion el la batalo de la negroj en Usono kontraŭ rasa diskriminacio kaj el la batalo de la virinoj kontraŭ seksa diskriminacio. Mi ne proponas, ke ni nepre imitu iliajn metodojn. Sed ili iom post iom sukcesas, ĉar ili sukcesas konvinki aliajn negrojn, aliajn virinojn, ke ili estas diskriminaciataj.

La samon ni devus fari.

Kredu al mi: tio ne estas facila tasko. Ĉiu, kiu iel profitas de la ekzistanta sistemo, estas kontraŭ ni: la grandpotencoj, la internaciaj organizaĵoj kontrolataj de tiuj grandpotencoj, ŝtatoj dominataj de ili, unuopuloj kiuj (en Svedio) lernis la anglan kaj fieras pro tio ktp.

Sed malgraŭ ili, aŭ pli bone: spite al ili, ni devas daŭrigi nian laboron por konvinki aliajn kunhomojn pri la lingva kaj kultura diskriminacio. Homoj, kiuj iam konsciigis pri ĝi, estas jam duone esperantistoj.

La laboro farenda estas multa, kaj tion ni neniam devas forgesi. La tasko, kiun ni transprenis, estas malfacila. Tion ni ne povas forgesi. Sed mi kredas, ke ni, malgraŭ nia malforteco, sukcesos.

Franko Luin

## Konstanta informado necesa

Certe ni ĉiuj samopinias, ke konstanta kaj prudenta informado pri la Internacia Lingvo en ĉiuj medioj estas necesaj, por ke Esperanto disvastiĝu kaj venku. Ni certe ankaŭ samopinias, ke la informado devas esti vera kaj objektiva laŭ la principaro de Frostavallen.

Sed ĉu informado sufiĉas por venkigi Esperanton? Mi pensas, ke ne. Oni tial bezonas ankaŭ propagandon. Sed propagando estas vorto, kiu ĉe multaj homoj havas malbonan sencon. Ĝi estas kvazaŭ mensa perforto, kvazaŭ devigo de la opinioj de homoj. Mi tial preferas la vorton "reklamo", vorto prenita el la fakvortaro de la komercistoj.

Kio do estas reklamo? Reklamo estas: 1) Informado en la plej konvinka formo kun la celo igi la homojn fari decidon (pri varo = aĉeti, pri Esperanto = lerni la lingvon aŭ subteni ĝin). 2) Reklamo estas ankaŭ rememorigado pri ideo aŭ nomo kun la sama celo kiel la informado. Se mi ekzemple aperigus afiŝon aŭ glumarikon kun la vorto Esperanto kaj verda stelo, tio apenaŭ estus informado sed nur reklamo. Reklamo plej efikas, se oni samtempe havas bonan informadon.

Ĉiu Esperanta societo landa aŭ loka devus ĉiujare fari laborplanon pri informado kaj reklamo. Tiu plano devus enteni ekzemple vizitojn ĉe aŭtoritatoj por informi ilin, prelegojn pri Esperanto en lernejoj kaj societoj, gazetinformadon. La reklamo ampleksas anoncojn, flugfoliojn ktp. kun invito al kursoj. La Semajno de Internacia Amikeco estas bona okazo informi pri Esperanto kaj fari reklamon por nia lingvo. Tial ĉiu Esperanto-societo preparu agadon dum la venonta SIA. Montrigiĝi, ke la ideo de amikeco trans limoj, de amikeco internacia, ordinare tre plaĉas ankaŭ al neesperantistoj.



Urboj kaj komunumoj tial ofte kunhelpas, ankaŭ ekonomie, aranĝi festojn, precipe por junularo, kun ekzemple muziko, kantado, regalo per kafo aŭ teo. Dum tiuj festoj oni kompreneble havu mallongan paroladon de eminentulo kaj mallongan prelegon pri Esperanto kaj ĝia movado. Jen nia afiŝo kun la emblemo de SLA kaj ĝia Esperanta teksto: "Amikeco trans limoj" estas reklamo. Ofte urboj aŭ komunumoj donas monon por disvastigi afiŝon kun nia emblemo, kiam ili subtenas la Semajnon.

La ĉi-jara semajno estos de la 19-a ĝis la 25-a de februaro. Utiligu ĝin. Kaj ne forgesu sendi saluton al viaj Esperantaj amikoj en aliaj landoj dum la Semajno.

**Erik Carlén**

Estrarano de UEA. Komisiito por la Semajno de Internacia Amikeco

---

## Redaktoro: Nova vesto

La Espero aperas ek de tiu ĉi numero en novaj vestoj.

Ni jam antaŭe komprenas, ke la nova aspekto estos akceptita diverse maniere de la legantoj. Al kelkaj ĝi certe tre plaĉos, al kelkaj tute ne, kaj kelkaj eble tute indiferece konstatos la fakton.

Permesu al ni tuj akcenti, ke ni ne ŝanĝas nur por havi la plezuron ŝanĝi. La decidon diktis antaŭ ĉio ekonomiaj konsideroj.

Ĉiu kiu observis la situacion nur en Svedujo povas facile konstati, ke la eldonado de gazetoj fariĝis dum la lastaj jaroj pli kaj pli malfacila pro la konstante kreskantaj kostoj. Tute simple malaperis pluraj revuoj kiuj havis multe pli da abonantoj kaj pli solidan financon bazon ol nia gazeto. Estus fakte tre strange se La Espero sola povus resti netuŝita de tiu malfavora evoluo.

Kion ni do celas? Jes, ni esperas en la kadro de niaj financaj rimedoj daŭre eldoni gazeton, kiu estos interesa, belaspekta kaj regule aperanta. Kaj ni ne volas malpliigi la nombron da numeroj po jaro; La Espero daŭre aperos ĉiun duan monaton.

Ni do elektis vestaĵon, kiu permesas al ni enigi pli da teksto en ĉiun paĝon. Sed samtempe ni volis modernigi la aspekton, tiel ke niaj legantoj ne havu la impreson, ke ni simple forigis ion bonan sen provi anstataŭigi ĝin per io samvalida.

La ŝanĝo koincidas kun la 60-jara datreveno de La Espero. La unua numero, redaktita de Rudolf Persson,

aperis en Gävle en februaro 1913. Eble ni en iu venonta numero faros rerigardon pri la sortoj La Espero. Sed nun ni volas antaŭ ĉio rigardi antaŭen. La Espero ŝanĝis sian aspekton plurfoje dum tiuj pasintaj sesdek jaroj. Ni esperas, ke tiu ĉi ŝanĝo estu konsiderata ne nur kiel necesa sekvo de ekonomiaj cirkonstancoj, sed ankaŭ kiel adaptiĝo al la postuloj de la moderna tempo kaj al la legantoj de la 1970-aj jaroj.

La esperantomovado, en Svedujo kaj en la mondo, havas grandajn kaj malfacilajn taskojn. Ni rekomendas al vi legi la artikolon de Franko Luin "Ni ne estas antaŭ nia tempo" en alia loko. Nia lingvo certe estas ilo, kiun la hodiaŭa mondo bezonas. En la batalo por ĝia disvastigo La Espero volas esti instigilo kaj helpilo. Tio estas grava tasko, sed kun la helpo de niaj legantoj ni volas ĝin plenumi.

---

## Vigla movado en Norda Vjetnamio

En la lastaj monatoj la okazaĵoj en kaj ĉirkaŭ Vjetnamio kaj la tragedia sorto kaj senlimaj suferoj de la homoj tie tiris al si la atenton de la homaro. En Svedujo ekzistas jam de jaroj forta movado simpatia al Norda Vjetnamio kaj FNL, kaj en niaj gazetoj respeguliĝis ĉirkaŭ la jarturniĝo helaj esperoj pri baldaŭa paco, sekvataj de nigra malespero kaj forta indigno pri la nova intensigo de la milito. Spite al la malfacilaj cirkonstancoj dum la lastaj jaroj evoluiĝis en Norda Vjetnamio forta movado esperantista, kaj ni okcidentaj esperantistoj speciale rimarkis la viglan eldonadon. Ĝis nun aperis 60 esperantolibroj de ĉiuj specoj — skizoj, eseoj, rakontaroj, romanoj, poemaroj kaj dokumentoj, tuŝintaj ĉiujn flankojn de la vjetnama vivo — historio, kulturo, folkloro, literaturo, sociaj aktivecoj kaj kompreneble, la milito.

Eble multaj esperantistoj ĉe ni, eĉ se ili havas certan simpatian por la afero de Norda Vjetnamio, emas sin forturni de tiuj eldonaĵoj, konsiderante ilin tro propagandaj. Kompreneble multaj el ili respegulas la oficialan politikon de Norda Vjetnamio, sed kiel ni jam pli frue akcentis en La Espero tio ne malpliigas ilian valoron. Unue ni devas alte respekti la samideanojn, kiuj dum malfacilaj militaj cirkonstancoj konstante laboras por

esperanto, due ne malutilas al esperantisto utiligi la eblecojn ricevi informojn rekte el ĉiuj flankoj.

La Esperantoasocio de Norda Vjetnamio starigis amikecajn kaj kulturajn rilatojn kun esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj en pli ol 60 landoj, speciale kun Sovetio, Ĉinujo kaj Japanujo.

Dum la pasintaj 15 jaroj, la asocio sukcesis esperantigi pli ol dumil kvincent personojn, kiuj per ekzameno ricevis sian ateston pri unuagrada lernado de esperanto. Ĉirkaŭ sepecent el ili ricevis la ateston pri duagrada kapableco. Hodiaŭ formiĝas, per regulaj kaj neregulaj esperantokursoj, tute novan generacion de esperantistoj, el kiuj multaj fariĝis tre aktivaj kunlaborantoj de la asocio. En Hanojo troviĝas esperantoklubo kie de tempo al tempo okazas kurso, ĉu unuagrada, ĉu duagrada, ĉu vespera, ĉu dumtaga, kaj kiu ĝenerale daŭras de tri ĝis kvin monatoj. Tie ankaŭ ofte kolektiĝas esperantistoj, ĉu por pridiskuti la labor-taskojn, ĉu por ĉeesti prelegon, ĉu por celebri datrevenon de iu amika lando.

La ŝtata Fremdlingva Eldonejo jam de pluraj jaroj havas sian esperantofakon, kies ĉefa respondeculo estas s-ano Nguyen Minh Kinh, malnova kaj lerta esperantisto. Esperanto do estas konsiderita en Vjetnama Demokratia Respubliko kiel unu el la oficialaj fremdlingvoj, kiun la ŝtato utiligas. Bedaŭrinde la ŝtataj aŭtoritatoj en nia t.n. okcidenta mondo ne ofte montras similan favoran sintenon al nia lingvo kaj movado.

La ĉi-supra artikolo baziĝas sur artikolo en la revuo Oomoto, Japanujo.

**Ake Blomberg**

## BELGRAD

Skandinavisk gruppresa till världskongressen med en vecka i Split. Skriv till Jan Strönné, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö, för närmare upplysningar.

## KALMAR ATENTIGAS:

Ĉiuj kiuj veturos per la ŝtataj Fervojoj al la SEF-kongreso dum pentekosto 1973 ricevos rabaton je 25% de la biletkostoj.

Glumarkoj kongresaj kostas 1: — kronon po folio de dek markoj. Haveblaj de

**Esperanto-Kongreso,  
J. Wik,  
Jupitervägen 8,  
381 00 Kalmar**

Poŝtgirokonta 86 00 73-6.



# Beograd-blanka urbo


La plej granda aranĝo en la esperantomondo en 1973 certe estos la 58-a Universala Kongreso de Esperanto en Beograd. Laŭ nombro da partoprenantoj ĝi verŝajne estos unu el la plej grandaj el niaj kongresoj, kaj tute ĝi estos unu el la plej imponaj.

Pri Beograd, la historia ĉefurbo de Jugoslavio, interesa balkana metropolo, rakontas tiu ĉi artikolo:

Beograd — la blanka urbo, kiel ĝia nomo asertas, preskaŭ tute ne portas la signojn de sia longa historio. Ĝi estas moderna grandurbo kun proksimume 1,200.000 loĝantoj; ĝi estas ankaŭ juna urbo, ĉar, onidire, ĉiu kvara beogradano estas lernanto aŭ studento. La historion de Beograd vi malfacile povos studi en ĝiaj stratoj, ĉar esceptante la murojn de la fortikajo Kalemegdan, kiuj datas el la antikvaj kaj mezepokaj tempoj, konserviĝis nura manpleno da konstruaĵoj el la 19-a jarcento: Altlernejo de Dositej, hospitalo Guberevac, la rezidejo de la Principo Ljubica kaj kelkaj aliaj domoj. Ĉu pardonpeti, ke la ĉefurbo de Jugoslavio havis iom tro tempestan historion, kiu inkluzivis senĉesan batalon por ekzisto, centojn da atakoj, kvardekon da regantoj, el kiuj ĉiu kutime detruis la trovitaĵon por konstrui tiun, kio estos ekstermoco de la sekvonta reganto. Sed tamen en trideko da beogradaj muzeoj vi trovos spurojn kiuj pruvas, ke la vivo ĉi tie ekzistis jam antaŭ sep mil jaroj almenaŭ. Vi tie malkovros ankaŭ, ke la urbo ĉe la rendevuejo de la granda Danubo kaj la plej granda jugoslavia rivero Sava, efektive naskiĝis antaŭ 24 jarcentoj sub la romia nomo **Singidunum**.

Sed, for la historio kaj ĝiaj suferoj! Ankaŭ Beograd turnas sin pli volonte al la estonteco. Tion vi vidos en ĝiaj stratoj, precipe en la avenuoj kaj bulvaroj de ĝia nova parto trans la rivero Sava, kie altaj kaj sveltaj loĝdomoj kaj oficejoj konstruaĵoj atentigas pri la ĉeesto de modernaj urboplanado kaj arkitekturo.

Oni asertas, ke en la someraj monatoj Beograd estas varma, sed oni ne preteratentu la faman beogradan venton "košava", kiu blove etas aŭ egas dum almenaŭ trident tagoj en la jaro. Cetere, ĉu oni entute serioze traktu la onidirojn pri la varmo, se ĉeestas du grandriveroj kaj tutaj urbaj kvartaloj (Košutnjak, Topčider), kiuj efektive estas parkoj. Proksimas ankaŭ la monto Avala (20 km) kun la impona Monumento al la Nekonata Heroo kaj



Detalo de la majesta monumento al nekonata heroo, sur la monto Avala apud Beograd.

televida turo, kiu altas pli ol ducent metrojn kaj proponas majestan panoramon ne nur de Beograd, sed ankaŭ de ĝia ondumita ĉirkaŭaĵo.

Beogradaj vesperoj — ni ne diras tiel, sed — vesperoj en "Skadarlija". Temas pri tuta kvartalo en la koro de la urbo, kiu rekonstrue reprenis la vestaĵon de la pasinta jarcento aŭ almenaŭ tiun de la komencaj jaroj de la jarcento, en kiu ni vivas. Ne nur la domoj kaj pavimoj, sed eĉ la homoj mem promenas tie en la kostumoj de antaŭ cent jaroj; en la tieaj teatro kaj kinejo oni prezentas programojn, kiuj amuzas per sia tempoparfumo; ĉe la "Du Cervoj", "Tri Ĉapeloj", "Ora Pokalo" aŭ "Skadarlija" mem — nomoj de malnovaj restoracioj — oni ankoraŭ povas aŭdi la plej aŭtentikan folkloran kaj malnovan urban muzikon kaj gustumi la plej famajn produktojn de la serbaj gastronomoj kaj vinkeloj.

Tamen, malguste estus supozoj, ke Beograd estas serba urbo, ĉar ĝi plene internaciigis, en la jugoslavia seneco de la vorto. Cetere, ĝia plej ofte uzata simbolo — la skulptaĵo de "Venkinto", kiu dominas la fortikajon-parkon Kalemegdan, estas verko de la fama kroata skulptisto Ivan Meštrović. Se vi iom pli funde esploras la noktan vivon de la urbo, estu certa, ke la kanto, kiun flustros en vian oreilon iu belulino, bedaŭrinde kun mikrofono, tiu kanto estos bosnia aŭ makedonia, eventuale cigana se violono ĉeestas. Senkonsidere de kie venas la civitanoj de Beograd, ĉu ili naskiĝis tie aŭ ili venas el Montenegro, Kroatio, Bosnio, Slovenio, Kosovo, Herce-

govino, Makedonio, Vojvodino aŭ Serbio mem, — ili ĉiuj sentas sin parto de Beograd, donante al kaj trovante en ĝi ankaŭ la parfumon de sia naskiĝregiono. Pro la bunteco de sia loĝantaro, kio tute estas ĝia ĉefa karakterizo — Beograd estas antaŭ ĉio — jugoslavia urbo.

Ni intence forgesis tamtami nian gastamon, ĉar oni ja malfacile trovas landon aŭ lokon en la mondo, pri kiu oni ne tamburus tiun jam banaliĝantan aserton. Tamen, se vi en niaj landoj kaj urbo pasigos almenaŭ parton de viaj ferioj, ni estas certaj, ke malgraŭ nia "fororgesemo", vi ekopinios, ke la vorto "gastamo" devus origini el tiu ĉi parto de la terglobo.

## Estonoj amas librojn

"Estonoj tre emas legi librojn. Sed ne nur legi el la kluba biblioteko. Ili deziras posedi la librojn."

Tiuj vortoj, eldiritaj de gvidanta esperantisto en Tallinn, s-ro J. Ojalo, bone prezentas la hodiaŭan estonon, kaj la hodiaŭan estonan esperantiston. Kiam aperas nova libro en Tallinn, homoj staras en vico dum tagoj por aĉeti ĝin. La libroj estas malmultekostaj, tiel ke kiu ajn povas aĉeti ilin. Librobretoj en estonaj hejmoj estas plenaj da libroj, bone zorgataj. Sed la eldonkvantoj ne sufiĉas por satigi la libromalsaton en Estonio.

Rigardu la "Kuŝantan tigron", kiu aperis en 1971, en 8 000 ekzempleroj. Tiu esperantlingva libreto elĉerpiĝis en kelkaj monatoj. Ĝi vendiĝis per ordinaraĵ librovendejoj en Estonio, sed se vi nun eniras vendejon, vi ne povas aĉeti ĝin. La sekreto estas, ke ĝi ja ne estas havebla por mono — sed nur donace.


Ĉar la gastamo de estonoj estas same granda kiel ilia amo al libroj. Kaj la eksterlanda gasto ne povas alveni aŭ foriri sen ricevi donacon. Libro estas bonvena ankaŭ longe post kiam ĝi elĉerpiĝis.

"Kuŝanta tigo" de Lilli Promet estas tradukaĵo el la estona en esperanton. Ĝi estas unu el la perloj de nuntempa estona novelarto. Presita en malgranda, invitema formato.

Ĝi estis la unua libro el serio da esperantolibroj, kiuj aperos dum la venontaj jaroj, unu libro po jaro. Eldonejo estas la ŝtata "Eesti Raamat", kaj la libroserio ebligis parte dank' al unu el ĝiaj ĉefredaktoroj, s-ino E. Kuusküll.

En 1972 jam aperis la dua libro, "Okupacio" de E. Krusten. Ĝi temas





Strato en Tallinn, kun la nomo "Malgranda piedo".

pri simpla homo kaj lia tragika sorto en la dua mondmilito, kaj apartenas al la plej elstaraj verkoj en la moderna estona lingvo. Ĝi tamen havas la saman agrable malgrandan formaton kiel la unua libro.

Kaj rigardu la planojn por 1973—1975. Unue aperos du poeziaj verkoj, en la traduko de la konata Hilda Dresden, nome unu antologio de estona poezio, kaj fragmentoj el la estona epozo "Kalevipoeg". Tiu lasta estas ne nur laŭnome sed ankaŭ laŭ enhavo simila al la finna Kalevala, kaj pro tio oni tradukas nur la plej bonajn pecojn. Poste aperos romano de la estona klasikulo E. Vilde, kaj ankoraŭ romano pri la dua mondmilito de nuntempa verkisto.

Por ni en Svedio eblas facile aĉeti librojn aperintaj en Estonio. Vendo en la alia direkto ne eblas. "La sola ebleco estas kiam iu jen kaj jen ricevas pakajon", oni diris. Samtempe s-ro Ojalo proponis ke la svedaj kaj estonaj esperantistoj intersanĝu ekspozicetojn pri siaj propraj landoj.

Multaj svedoj scias nenion pri Estonio. Multaj tute ne scias kie ĝi situas. Sed mirinde multaj parolas la estonan, kvankam estas nur malgrandaj eblecoj lerni ĝin tie ĉi.

Ne multaj turistoj trovis la vojon al Tallinn, la ĉefurbo de Estonio, kiu siavice estas unu el la sovetaj respublikoj. Multaj el tiuj kiuj veturas tien el Svedio estas ĝuste tiuj iamaj estonoj, kiuj nun loĝas en Svedio, sed kies parencoj restas en Estonio.

Sed Tallinn meritis pli da vizitantoj. Ni ja opinias ke vizito al Helsinko estas mallonga vojaĝo, kaj Tallinn estas nur 4-horan ŝipveturon pli for. En Tallinn oni trovas interesajn homojn, multe da malnovaj mezepokaj konstruaĵoj, kaj alian vivmanieron, alian vivfilozofion. Esperantistoj ne mankas. Kvankam la nombro de estonoj estas nur iom pli ol unu miliono, troviĝas inter ili same multaj esperantistoj kiel en Svedio.

S-ino Kuusküll, kiu ne estas nur ĉefredaktoro sed ankaŭ reprezentas la esperantistojn ĉe la respublika societo por internacia amikeco, salutis "Diru al aliaj ke ili venu al Tallinn, kaj ke ili kontaktu la klubon antaŭe."

Tio restu ankaŭ la saluto de la triopo kiu ĵus vizitis Tallinn, nome Aino Mäkinen, Märta-Greta Akerberg kaj mi.

Ulla Luin

## Nigra libro pri la mondo

**KONTAKTO**, la organo de nia internacia junulara movado, **TEJO**, dediĉis unu tutan numeron en 1972 al la problemoj de la tria mondo. Ĉar ni opinias, ke tiuj problemoj devus interesi ĉiujn esperantistojn; — ni ja laboras en tutmonda kadro por internacia interkompreniĝo — ni permesas al ni ĉerpi el tiu numero de **KONTAKTO** la ĉi-suban artikolon. Povas esti ke ĝi estas iom tro pesimisma, la aŭtoro iom tro kritika, sed la artikolo estas en ĉiu okazo pensiga kaj meritas atenton:



Se la statistikoj ne ŝanĝiĝos pro neatenditaj kaŭzoj, la industria mondo (Usono, Sovet-Unio, Japanio kaj Eŭropo) havos en la jaro 2000 pli ol unu kaj duonan miliardon da enloĝantoj, kiuj konsumos po 5 000—10 000 dolarojn jare. La Tria Mondo tiam enhavos kvar kaj duonan miliardojn da homoj, kun ĉiujara konsumo de 200 dolaroj popersone.

En tiu epoko, ni do vivos en mondo, kiu loĝigos trioble pli da malriĉuloj

ol da riĉuloj. Sed, en tiu sama mondo la malriĉuloj konsumos dudek- ĝis tridekoble malpli ol la riĉuloj.

Tiu distingo estos spertata de miliardoj da viroj, virinoj kaj infanoj kiel peza maljusto. Ili estos la "parioj" de la moderna mondo.

Por kio utilos nia progreso, kion ni faru per salajroj de 10.000 dolaroj en la jaro 2000, por kio servos niaj "Konkord"-aviadiloj flugantaj 2.000 kilometrojn pohore, kaj niaj komputiloj, se tio samtempe signifos, ke ni vivos sur planedo kun preskaŭ kvin miliardoj da ribelemaj malriĉuloj, malsatuloj kaj analfabetoj, kiuj disvastigos la misefikojn de kolero same kiel de anarkismo? Ni permesas la mondon dezertiĝi, kaj tio estos la granda peko de nia epoko. Oni devus verki "Nigran Libron" pri ĉiuj misoj de ni faritaj, de post kiam la problemo de la Tria Mondo vekigis en nia konscienco, t. e. de post la kvindekaj jaroj.

### Kvar eraroj

La unua demando, kiun oni sin demandu, estas: ĉu oni povas prave diri, ke la nuna politiko de evolukunlaboro helpas al la Tria Mondo disvolviĝi? Dek sep riĉaj landoj distribuas sian helpon al 85 malriĉaj landoj. Tiun helpon ili donas pere de pli ol mil duflankaj helpagadoj, kontraktoj kaj kunlabortraktatoj. Tiuj estas ĉiujare revizieblaj, se la financa aŭ politika situacioj de la donacanta lando tion postulas. Unu murdo aŭ oleokonflikto povas sufiĉi por ĉesigi la promesitan helpon.

Kiele tia kaosa organizo de la helpo povas ebligi al favorata lando formi

sanon kaj daŭran bazon por evoluplano? La novkoloniisma karaktero de la almozdona helpo, kia ĉi tiu speco estas, krome bazita sur kompensaj politikaj aŭ komercaj kontraŭfavoroj, atakas kaj subfosas la suverenecon de la junaj ŝtatoj.

La dua eraro koncernas laŭ paralela maniero la t. n. multflankan helpon, do — la helpon de Unuiĝintaj Nacioj, de UNESKO, Monda Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo, Monda



San-Organizaĵo, ktp. La nura diferenco estas, ke ĉiĉfoje ne temas pri politika, sed pri administra miso.

Ekzistas tri faktoroj, kiuj kaŭzas la nekredoblan malefikecon de la helpo: la burokratismo, la nesufiĉo de la rimedoj, kaj trie — la funkcia problemo rezultanta el la karaktero de tiuj ĉi grandaj organizaĵoj. La evoluo de iu lando dependas de samtempaj klopodoj sur ĉiuj terenoj: antaŭenpuŝo de la instruado estas senvalora, se ne samtempe la agrikulturo, la popolsano kaj la industrio estas antaŭenpuŝataj. La Unuigintaj Nacioj fiaskis en sia politiko por la Tria Mondo, interalie pro tio, ke tiu organizaĵo kreis specialigitajn superorganizaĵojn, anstataŭe al integra tutmonda agado.

La tria miso estas trovebla ĉe la landoj de la Tria Mondo mem. La 85 landoj de la Tria Mondo (escepte de Hindio), ĉiuj poe konsistigas tro malgrandajn ekonomiajn sociojn, por ke propra ekonomia evoluo havu ian ajn ŝancon je sukceso. Eĉ Brazilo, malgraŭ la teritoria vasteco kaj la 95 milionoj da enloĝantoj, estas pli malgranda ol Hispanio se oni konsideras la nacian produkton. Dahomeo estas tiurilate malpli granda ol urbo kia Nant, kaj la tuta afrika kontinento estas pli malgranda ol Italio.

La evoluo de tiel malgrandaj unuoj estas neserioze konsiderebla. Kaj tamen, neniu ŝtatestro en la Tria Mondo vere klopodis krei koherajn ekonomiajn komunumojn, kiuj povus enkadrigi organizitan evoluoprocezon. Naciisma mensostato, de pasintepoka speco, kaŭzas, ke tiuj malgrandegaj ŝtatoj nepre restos subevoluintaj, ke ili stagnos kaj malprogresos.

Krome, oni devas konsideri la malŝparojn de la donata helpo, en fakoj de konstruado, publikaj servoj, defendo kaj la perdado de "cerboj" pro la formigrado de finstudintoj en riĉajn landojn.

#### Komuna eraro

La kvara miso estas eraro komuna al ambaŭ flankoj: nek la donacantoj nek la ricevantoj komprenis, ke la edukado de homoj el la Tria Mondo (fundamenta ŝlosilo por la evoluo) ne devus okazi per la instrusistemo de la malnovaj landoj. Ekzistas tro da homoj kun diplomoj, tro da oficistoj, tro da altaj funkciuloj, sed mankas la sperta profesularo, la praktikuloj kaj la iniciatemuloj. Post dudek jaroj da evoluhelpo al la Tria Mondo, eĉ ne unu organizaĵo komencis eĉ la unuan ekon de nova instrusistemo por la infanoj de la Tria Mondo.

#### Fiasko

Ciferoj demonstros la monumentecan fiaskon de la politiko post la Dua Mondmilito. Ni celas ĉi tie la statistikon de la Nutraĵa kaj Agrikultura Mondorganizaĵo pri la evoluo de la agrikultura produktado en la tri kontinentoj de la Tria Mondo dum dek kvin jaroj. Oni devas konsideri, ke dum tiuj dek kvin jaroj, de 1952—54 ĝis 1967—69, ĉiuj landoj de la Tria Mondo sendependiĝis, ke ili ricevis grandan financan kaj teknikan helpon (ekzemple, oni konstruis gran-

dajn akvobariolojn, kiaj estas la Kariba en la Zambezi-rivero kaj la Asuana en Nilo), kaj ke ili povis profiti la "verdan revolucion", kiu kaŭzis grandajn rikoltojn de bonkvalitaj vegetaĵoj.

Sed, malgraŭ ĉi tiuj samtempaj pozitivaj faktoroj, oni laŭ la statistiko devas agnoski, ke neniam da produkttoaltiĝo okazis en tiuj landoj. En Latin-Ameriko, la koncerna indekso restis daŭre ĉe 100 dum la jaroj 1952 ĝis 1969. En la Mez-Orientaj landoj ĝi apenaŭ kreskis ĝis 105, kaj en Afriko ĝi malkreskis ĝis 92. Tio signifas, ke la kresko de la produktvolumo precize egalas la kreskon de la loĝantaro, nome — 2,9 procentoj ĉiujare.

La Tria Mondo efektive estas survoje al subevoluiĝo. Ĉu la tasko al Eŭropo, la unua granda ne-imperiisma potenco, ne estas — radikala revizo de la helpo al la Tria Mondo?

**Moris Gernje** ("Mond")

## HELSINGÖR

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos denove en 1973 (22—29 de julio) en La Internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj pasigi neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Programo estas senpage havebla ĉe

**L. FRIIS**

Ingemannsvej 9

DK-8230 Åbyhøj, Danlando

Om du vill ha en årsbok med

- adresser till delegater och fackdelegater i hela världen
- boklista med alla esperantoböcker som kan köpas
- esperantoförbund i andra länder
- tidskrifter
- våglängder för radiosändningar på esperanto

Om du regelbundet vill läsa i Revuo Esperanto om

- viktiga händelser i esperantovärlden
- recensioner
- artiklar av ledande esperantister i olika länder
- småannonser

## Då ska du bli medlem i UEA

### Sänd 43,- till postgiro 14 74 29-5

43,— kr till postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperantoförbundet, Specialkonto. Skriv MA på talongen.

Du kan också få rabatt, eller betala stödjande avgift, i följande kategorier (förutom MA ovan):

- **JMA 32,25 kr**  
Ungdomsmedlem under 22 år med årsbok, tidning Esperanto och tidning Kontakto
- **MAK 43,— kr**  
Ungdomsmedlem 22—25 år med årsbok, tidning Esperanto och tidning Kontakto
- **JMJ 10,75 kr**  
Ungdomsmedlem under 22 år med endast årsbok
- **MJ 21,50 kr**  
Medlem med endast årsbok
- **MS 64,25 kr**  
Stödjande medlem, med årsbok och tidning Esperanto
- **DM 860,— kr**  
"Dumviva medlem", betalar 20 MA-avgifter och är sedan ständig UEA-medlem

**Svenska Esperantoförbundet**



## Kelkaj recenzoj

SOLECO. Romano de Victor Catala. Tradukita de Josep Ventura I Freixas. 287 paĝoj. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö. 44: 20 sv. kr.

Victor Catala, pseŭdonimo por Caterina Albert i Paradis, estas unu el la grandaj nomoj de la kataluna literaturo, kaj SOLECO estas ĉefverko de tiu tre riĉa literaturo, kiu donis al esperanto inter alie la Katalunan Antologion.

Kiel multaj grandaj klasikaj verkaĵoj ankaŭ SOLECO ne estas tuj facile digestebla kaj ne rekomendinda al komencantoj. Ĝi estas profunda psikologia studo pri la sorto kaj reagoj de juna virino, kiu subite sin trovas vivanta en izolita ermitejo alte en la montaro, sola kun tri — kvar homoj: ŝia edzo, kiu estas ermito — t. e. prizorganto de la sankta ermitejo —, knabeto el farmdomo longe for, maljuna paŝtisto, saĝa, vivsperta, kaj Spektro, mizera homestaĵo kiu kvazaŭ enkorpiĝas la Malbonon. Simile al nia "Gösta Berling" la romano redonas la apartan etoson de medio, konata al la enloĝantoj de certa provinco, sed fremda kaj stranga por alilandano. Sed same kiel Selma Lagerlöf sukcesis transformi la vermlandajn tradiciojn pri Gösta Berling en romanon, kiu fariĝis universala klasikaĵo, tiel ankaŭ la verkaĵo de Victor Catala apartenas al la tuta homaro. La medio de la romano estas fremda por sveda leganto, sed la problemoj de ĝiaj homoj estas

same konataj al ni, ili estas universalaĵoj. La poezia lingvo fluas kiel majesta muziko kaj forte impresas la leganton. Ĉi tiu verkaĵo estas trezoro ankaŭ por la esperanta literaturo kaj ĝi meritas atenton kaj... legadon. Presita sur bona papero kaj ilustrita per artaj desegnaĵoj. **AB**

ADORU KANTANTE, Evangelia Himnaro. Eldonis KELI. Havebla ankaŭ ĉe Eldona Societo Esperanto.

Adoru Kantante estas impona verko kaj rezulto de preskaŭ dekjara laboro de internacia komitato en KELI. Unu el la kunlaborantoj estas nia Āke Ahlrén.

La libro ampleksas 262 himnojn kun notskribo por kvarvoĉa ĥoro. La himnoj estas zorge elektitaj el la kanto-trezoro de diversaj landoj kaj la tradukoj kompetente kontrolitaj. El la sveda Evangelia Kantaro oni ĉerpis plurajn, same el la brita Himnaro Esperanta. Diversaj enhavotabeloj helpas trovi serĉatan himnon.

Tiu libro dum jardekoj estos la bazo kaj fonto por la kantemaj KELI-rondoj. **Salex**

## Pli multaj tradukoj

Oni faras en la mondo eĉ pli da tradukoj. Laŭ la ĉiujara listo de Unesko, la **Index Translationum**, kiu ĵus publikigis, dum 1970 oni eldonis 41 322 tradukitajn verkojn en 73 landoj, kompare kun 38 172 verkoj en 65 landoj dum 1969.

Por la unua fojo dum multaj jaroj, ne estas Sovetio, kiu plej multe eldonis. La **Index** montras Germanujon (t. e. La Federacia Respubliko kaj la Demokrata Respubliko kune) kiel plej tradukeman, eldonintan 5 932 tradukojn, dum Sovetio sekvas kun 3 580. Germanujo pliiĝis tradukojn per 2 394 kompare kun 1969, kaj la sumo de Sovetio malpliiĝis per 3. Hispanujo pliiĝis sian nombron de 2 737 ĝis 2 944, sed restas sur la tria loko.

La kvaran lokon atingas Usono kun 2 569 kompare kun 2 059 en 1969, superante Japanujon, kiu restas sur la kvina loko kun 2 069, t. e. malpliiĝo de 98. Francujo okupas la sepan lokon kun 1 918; poste venas Nederlando kun 1 651, Italujo kun 1 587 (kompare kun 2 483 en 1969, kiam tiu lando staris kvara en la vico), Svedujo kun 1 539 kaj Ĉeĥoslovakio kun 1 440.

Tradukoj de ambaŭ Testamentoj de Biblio daŭre plimultiĝis, sumigante en 1970 je 223 kompare kun 202 en 1969 kaj 187 en 1968.

(Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)

Du har vël inte glömt

## ESPERANTO-NYTT

SEF:s fyrasidiga informationsblad. Utkommer en gång i kvartalet. Kortfattad. Våredigerad. Lämpar sig för spridning bland politiker, skolfolk, bibliotek etc.

Pris: 2: — kr per år.

Adress: Voxnegränd 24,

121 60 Johanneshov.

Postgiro 20 65 88

## VÄNSKAPENS VECKA

19—25 febr.

Välj

PRESENTBOKEN

till utlandsvännerna

från vår boklista i

La Espero nr 6/1972.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

## LÄTT OCH BEKVÄMT

skaffar vi allt som finns upptaget i  
UEA:s boklista i årsboken, del II.

MEDDELA OSS DINA ÖNSKEMÅL!

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgirokonto 578-5



## Rumanoj pri 'La Espero'

La rumana gazeto "Facia" (La Torĉo) kiu aperas en la urbo Cluj (ĉefurbo de la rumana provinco Transilvanio), en sia numero de la 10-a de sept. 1972 publikigis favoran recenzon pri nia revuo, sub la titolo: "La Espero — despre Transilvania" (= La Espero pri Transilvanio), de Emil Bunea. Ni citas el la recenzo la komencon kaj lastan alineojn:

"La prestiĝa revuo La Espero, aperanta en Svedlando, sed disvastigita en la tuta mondo, delonge publikigas preskaŭ en ĉiu numero materialon pri nia respubliko Rumanio, aŭ el ĝia malnova historio, kun malfacila sorto, de ĉi tiu terparto."

"La eleganta stilo, ĝusteco de la sciencaj datoj, dokumentita materialo kaj nobleco de la celo, jen kiuj indikoj instigis nin verki ĉi artikolon, kiel rekonon pri la laboro de s-ro Tiberio Morariu, Esperanta publicisto de pluraj jardekoj."

Lasta dato por manuskriptoj por la sekvonta numero de La Espero: 1-a de marto 1973!

## Din anmälan till världs- kongressen

Som du redan vet, blir Beograd i Jugoslavien platsen för årets världskongress. Svensk förmedlare (peranto) är som vanligt endast Svenska Esperantoförbundet. Anmälningsblanketter kan du beställa hos fru Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040-652 09). Till samma adress återsänder du anmälningsblanketten. När det blir dags beställer du även utfärder och logi hos fru Andrén.

Avgifterna betalar du till postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.

Kongressavgifterna är lägre för den som är direkt medlem i UEA och för den som anmäler sig tidigt. Du får här nedan kongressavgifterna, enligt olika kategorier. Den första avgiften gäller den som anmäler sig före den 31 mars, den andra för den som anmäler sig före den 20 juni.

1. Kongresano, NEmembro individua de UEA: 150: —/163: —.
2. Kongresano, individua membro de UEA kun Jarlibro (MJ): 127: —/141: —.
3. Kongresano, individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto": 105: —/118: —.
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1: 106: —/115: —.

5. Edz(in) o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3: 88: —/96.
6. Junul(in) o ĝis inkl. 20-jara: 46: —/50: —.
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara: 76: —/82: —.
8. Blindul(in)o: 61: —/66: —.

När du anmäler dig, skriv tydligt ditt namn och adress, men inte några anmälningsavgifter; det gör SEF. Meddela i stället avgifterna tydligt på postgirotalongen eller helst i ett särskilt brev tillsammans med anmälningsblanketten.

När du betalar din kongressavgift, lägg gärna till några kronor för de särskilda kongressfonder som finns, t. ex. Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta kaso (för dem som inte kan betala från sitt land) och Adoptaj gepatroj (för barnkongressen). Du får självfallet gärna bidra till dessa fonder, även om du själv inte tänker åka till kongressen.

SEF

## Koresponda anonco

Junaj (kaj ne nur junaj) volas korespondi kun vi pri ĉio. Ĉu vi volas entuziasmigi ilin? Bv. skribi al la peranto: Josef Vitek, Box 25, 276 80 Melnik 1, Ĉeĥoslovakio.

Konstrui per

# YTONG<sup>®</sup>

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

## YTONGBOLAGEN

Hällabrottet



## Anmälan på nytt sätt

Anmälningsblanketten för årskongressen i Kalmar består av ett inbetalningskort, som bifogas detta nummer av La Espero. Ytterligare blanketter kan erhållas från Esperantokongressen, J. Wik, Jupitervägen 8, 381 00 Kalmar, eller från SEF:s sekretariat. Det går också bra att använda ett vanligt inbetalningskort.

Gör så här:

1. Läs igenom det meddelande som sitter ihop med inbetalningskortet. Där finns uppgift om avgifter och om sista anmälningsdag. Meddelandet skall inte skickas in, utan det kan användas för egna anteckningar.
2. Fyll i inbetalningskortet. Skriv på baksidan av mottagardelen vad beställningen gäller. Baksidan av mottagardelen (talongen) kan då se ut så här:  
Deltagaravgift för Anna Nilsson  
Deltagaravgift för SEJU-medlem för Maria Nilsson  
2 kongresspaket, dubbelrum (tillsammans)  
Vi har samma adress.  
Eller till exempel så här:  
Deltagarkort, enkelrum 9—10 juni,  
1 frukost, 1 diné, 1 lunch.  
Järnvägsbiljett Göteborg—Kalmar och åter.
3. Räkna ut hur mycket du skall betala och fyll i det också. Betala in beloppet på posten.

Det är inte så krångligt som det låter. Gör ett försök! Skulle det inte vara tillräckligt med plats på mottagardelen, går det bra att skriva till kongresskommittén också.

SEF:s sekr.

## Vänskapens vecka i år

La semajno de internacia amikeco — den internationella vänskapens vecka — infaller i år 19—25 februari

och bör uppmärksammas av alla esperantister.

Föreningarna bör lämpligen anordna en festlig sammankomst med något program i anslutning till temat för veckan: vänskap över gränserna. Där möjlighet finns kan man också anordna någon offentlig sammankomst, eller en sammankomst i samarbete med andra organisationer och speciellt inbjuda.

Enskilda esperantister, som har vänner i andra länder — och det har de flesta — bör höra av sig, åtminstone med en kort hälsning på ett brevkort.

Det finns brevmärken att sättas på kuvert eller kort. Pris 60 öre per ark om 6 st. (inkl. moms). Utan tidsangivelse, men bör användas endast i samband med vänskapsveckan.

Dessutom postkort, 40 öre/st. för större format, 20 öre för mindre.

Det finns också affischer (för butiker etc.) till 11 öre st.

Beställes endast hos

Stiftelsen AMIKECO TRANS LIMOJ  
S-690 60 Kumla.

Postgiro 14 32 10-3.

## Feriaj kursoj en Helsingör

Anonco en alia loko informas ke okazos ankaŭ en 1973 (22—29 de julio) la Internaciaj Feriaj Kursoj en Helsingör. Ĉar tiu aranĝo estos jam la 42-a ni opinias, ke tiuj kursoj, konataj en la tuta esperantomondo, meritas apartan mencion.

Arĝanto kaj ĉefmotoro de la kursoj estas s-ro L. Friis, energia kaj sperta malnova esperantisto, kiu ankaŭ estras Dansk Esperanto-Förlag. La hejmo de la kursoj estas La Internacia Altlernejo en Helsingör, kaj la altlernejo ĉirkaŭas granda parko, kie la partoprenantoj povas ĝui multajn promenojn. Ĉiuj kursanoj loĝas kaj manĝas en la altlernejo, kie ili formas grandan rondon familian. Nur esperanto estas parolata.

Instruado okazas nur antaŭtagmeze — en jenaj kursoj: 1) Elementa kurso, 2) Konversacia kurso, 3) Perfektiga studrondo, 4) Prepara kurso por Friis-metodaj instruistoj.

Posttagmeze ĝenerale okazas ekskursoj al diversaj vidindaj lokoj, ekz. al Kronborg (la kastelo de Hamlet), Hilleröd kaj la kastelo Fredensborg. Vespere diversaj distraj programoj.

Se vi havas intereson, petu la programon kun ĉiuj prezindikoj de s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 ÅBYHÖJ, Danlando.

## Dessa är med i styrelsen

Som du ser har vi ändrat även på sista sidan. De uppgifter som har förekommit här tidigare finner du dels på sidan 7 (om världskongressen) dels här nedan. I fortsättningen kommer vi att publicera sådana uppgifter bara ett par gånger per år. Vi kommer i stället att disponera sista sidan för annan text. Spara därför detta nummer. Du kan behöva det.

Fram till årskongressen i Kalmar sitter följande i styrelsen för SEF:  
Jan Strönne, ordf., Amiralsgatan 36,  
211 55 Malmö, tel. 040-12 92 11.

Ragnar Hjorth, vice ordf., Kronobergsgatan 25, 4 tr. ö.g., 112 33  
Stockholm, tel. 08-52 76 67.

Ulla Luin, sekr., Myggdalsvägen 123,  
135 00 Tyresö, tel. 08-712 82 91.

Sven Alexandersson, kassör, Krokvägen 85, 122 32 Enskede, tel.  
08-49 80 24.

Märta Andreasson, Lilla Tolsered,  
420 11 Hisings Kärra,  
tel. 031-67 01 33.

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B,  
752 23 Uppsala, tel. 018-11 73 09.

Nils G Johansson, Karlshovsvägen 48,  
602 13 Norrköping,  
tel. 011-16 69 33.

Franko Luin, Myggdalsvägen 123,  
135 00 Tyresö, tel. 08-712 82 91.

Bertil Åkerberg, Lillsvängen 39,  
125 57 Hägersten, tel. 08-46 29 25.

Ring gärna någon av dem.

## La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,  
Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Redaktör: Ake Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-235 26 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 20 kr.

Förbundets sekretariat är öppet  
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-62 58 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1973



## Deltagaravgifter för SEFs årskongress i Kalmar, 9–11 juni 1973

### 1. Deltagarkort (ingår inte i paketet)

Hel avgift ..... 25: —  
SEJU-medlem ..... 10: —

### 2. Kongresspaket (exkl deltagarkort)

Dubbelrum (1 person) ..... 180: —  
Enkelrum ( 1 person) ..... 210: —

### 3. För dem som inte kan beställa kongresspaketet

Dubbelrum 1 natt (1 person) ..... 40: —  
Enkelrum 1 natt (1 person) ..... 55: —  
1 frukost ..... 6: 50  
Meddela vilken dag Ni deltar!

Diné pingstafton ..... 30: —  
Lunch pingstdagen ..... 20: —  
Thesupé pingstdagen ..... 10: —  
Bussresa + lunch annandagen ..... 27: —

4. Järnvägsbiljett med 25 % rabatt kan beställas samtidigt, och skickas mot postförskott i slutet av maj. Meddela resväg!

Sista anmälningsdag är 18 maj 1973!

Detta meddelande avskiljs före inbetalning på posten och behålls av Er själv.

## POSTBANKEN POSTGIRO

Mottagardel

## INBETALNING / GIRERING B Arkivdel

Meddelande till betalningsmottagaren

Beställer enligt specifikation på baksidan av denna talong  
Önskar järnvägsbiljett  
Önskar vegetarisk mat

Avsändare (namn och postadress)

Till postgirokonto nr Avgift

86 00 73 — 6

Betalningsmottagare (endast namn)

Kalmar Esperantoförening

Redovnr

Avsändare (namn och postadress)

Eget kontonr vid girering

Underskrift vid girering från eget konto

Till postgirokonto nr

86 00 73 — 6

Kronor

öre

Kronor

öre

Tidningsbilaga

I FÄLTET NEDAN FÅR ANTECKNINGAR INTE GÖRAS — RESERVERAT FÖR MASKINELL LÄSNING

Bl 2021.04 [sept 72] 6989 □ 434-72

#

8600736#02#